

## 150–199 paŝoj – 53 baladoj

& La kruela somero: .....	54	& Granda bovo: .....	81
& Ĝorgo: .....	55	& Ĝon Boj: .....	82
& Ne ŝovu vian nazon: .....	56	& Kie flankas vi: .....	83
& Al fonto iris virgulino: .....	57	& Miskompreno: .....	84
& Neniam: .....	58	& Ŝipisto: .....	85
& Plej urĝa tempo: .....	59	& Kampulo kaj edzino: .....	86
& Tramo kaj ĉevalo: .....	60	& Laŭ la cirkonstancoj: .....	87
& Trumpeto kaj gitaro: .....	61	& Brikaĵoj: .....	89
& Fore li restas: .....	62	& Ho katenoj, vi katenoj: .....	90
& Logas la aventur': .....	63	& Interkona balado: .....	91
& Malliberejo: .....	64	& Kantoplenas nun la tag': .....	93
& Taŭro kaj kolibro: .....	65	& Rimvanto: .....	94
& Inter du malbonoj: .....	66	& Al la semanto: .....	95
& Senkompata oktobro: .....	67	& Araneo kaj vesperto: .....	96
& Mi songis dum nokthoro: .....	68	& Karoto kaj rozo: .....	97
& Kien floroj iris do: .....	69	& La avida hundo: .....	98
& Arto de vivo en paroj: .....	70	& La lupoj kaj la ŝafido: .....	99
& Birda festo: .....	71	& Papago kaj pasero: .....	100
& La ĉevalo kaj la azeno: .....	72	& Papilio kaj nekroforo: .....	101
& La lango kaj la mano: .....	73	& Tragedieto: .....	102
& Lasta kiso: .....	74	& Sopiris junreĝido: .....	104
& Libero: .....	75	& Unueco: .....	105
& Memorigo: .....	76	& Plejbonĉeval' kaj plej bona font': .....	106
& Amuzas maristo juna: .....	77	& Inter kaptitoj: .....	107
& Cigno kaj alvuso: .....	78	& Plej facila sur la tero: .....	108
& Eta kaŭzo – granda efiko!: .....	79	& Post la operacio: .....	109
& Fredmana kanto n.ro 61-a: .....	80		

## & La kruela somero:

< Rekante 5 el 25 batoj por strofo, entute 150 paŝoj dum 2 minutoj. Poemon verkis Emba (3-4/84, Sub la signo de socia muzo. Redaktis William Auld & Stefan Maul). Baladigis, komponis kaj rekantaĵon aldonis Martin Strid (2015).>

### (#Melodio:

<:25> (

mi /dodo mimi rere dore miimi;mi soso mimi rere dore miimi;mi  
dodo mimi rere dooTi;La SoSo doTi La La;

(#Rekantaĵe: La SoSo doTi La La)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Ne /ĝojas mi, se venas la  
somero: ; en ĝia arda koro  
mankas amo, ; kaj mian  
karnon trasekigas ; ĝisoste ĝia  
flamo.

(×:; **Kruelas la somero.**)

'2 Se la vizaĝo soifegas roson,  
; ĝi trempas ja en ŝviton mian  
vangon, ; kaj ĝia pluvavida  
tero ; elsuĉas mian sangon. ....

'3 Kiam la klingo de falĉil'  
ektintas ; rande de ora ocean'  
da greno, ; pen' dentgrinciga  
por mi ŝanĝas ; la benon je  
malbeno. ....

'4 Rifuĝi nur la Moŝta Mono  
povas ; al bordoj de la freŝo-  
spira maro. ; Mi trenas ŝarĝon  
kiel en la ; dezert' la  
dromedaro. ....

'5 Mi trenas ŝarĝon, besto  
tolerema, ; nur foje, se mi  
estas mistraktata, ; ekbolas en  
mi por momento ; sango de  
lup' malsata. ....

'6 Ne timu, la falĉilon  
rektigitan ; ne kaptos mi en tia  
hor' ekscita ; por puŝi ĝin en  
iun moŝtan: ; mi estas ja  
dresita! ....)

## & Ĝorgo:

< Ripete 9 el 25 batoj por strofo, entute 150 paŝoj dum 2 minutoj.  
El angla tradukis William Auld.>

### (#Melodio:

<:25> (

a;Mi /dodo TiTi LaaLalSo Mi;Ti dore mimi Tildo re;Ti dore mimi  
reeTilLa So;La SoMi MiRe MilLa La;Ti dore mimi reeTilLa  
So;La SoMi MiRe MilLa La

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Rajd/beston mian bridu2  
nun ; poneo mia pre2tu ( ; ke  
mi forrajdu ĝis Lo2ndon' ; ke  
mi pro Ĝorgo ple2du.)×

'2 Kaj kiam halen veni2s ŝi ;  
ne mankis la gelordoj: ( ; Ŝi tie  
pledis sur ge2nu' ; per  
pardonpetaj vo2rtoj.)×

'3 Kaj tiam Ĝorgo turni2s sin ;  
kaj sian kara2n vi2dis. ( ; Li  
diris: "Tro malfrue2, ve, ; la  
sorto jam deci2dis." )×

'4 Lin alparolis la ju2ĝist' ;  
dirante: "Tristas ti2o ( ;  
konfeso propra damni2s vin ;  
do vin kompatu di2o." )×

'5 Ne ŝtelis for bovino2jn  
Ĝorgo ; nek murde li ofe2ndis  
( ; sed dek ĉevalojn de la2 reĝ'  
; li ŝtelis kaj forve2ndis.)×

'6 En oraj ĉenoj pendu2 Ĝorgo ;  
ĉar li ne malbonfa2mis ( ;  
nobela estis la de2ven' ; kaj li  
virtulinon a2mis.)× )

## & Ne ŝovu vian nazon:

< Ripete 18 el 25 batoj por strofo, entute 150 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Cezar laŭ proverbo de Zamenhof. Baladigis Martin Strid (2016) per nova melodio kaj ripetoj.>

### (#Melodio:

<:25> (

/Do MiMi ReRe Do Do;Mi SoSo FaFa Mi Mi;So dodo TiLa So  
Mi;Do MiMi ReRe Do Mi;So dodo TiLa So Mi;Do MiMi ReRe  
Do Do

)×6 )+

### (& Strofoj:

'1 (/Ne ŝovu vian nazon ; en  
iun fremdan vazon, ;)×3

'2 (respektu privatecon,; elektu  
ĉiam decon. ;)×3

'3 (Se vi spionas homojn ; kaj  
orelumas domojn, ;)×3

'4 (vi estas sen respekto ; pro  
kruda decneglekto. ;)×3

'5 (Ne estu fi-scivola ; eĉ tute  
libervola. ;)×3

'6 (Do for de fremda vazo ;  
per tro scivola nazo. ;)×3

## & Al fonto iris virgulino:

< Ripete 16 el 31 batoj por strofo, entute 155 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #4141. Popolkanto el Skanajo. El sveda tradukis Kukoleto (1993 -IORe). Baladige forprenis unu takteron MartinStrid (2016). Klarigoj (\*): '1 Virgulino, ĉu fraŭlino ĉu ĉambra servistino. '2 Tel = tiel. '5 Honoro de virgulino = ŝia virgeco.>

### (#Melodio:

<1,5:> (  
o;SO /DoTI DoRe MiRe Dodo LaSo Lado So o;SO DoTI DoRe  
MiRe Dodo LaSo Lado So;So doMi FaLa SoMi DooReRe MiFa  
ReTI Do o;So doMi FaLa SoMi DooReRe MiFa ReTI Do  
)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 (Al /fonto iris virgulino\*,  
akvon prenos ŝi ;)×  
(Avelbranĉeto staris tie,  
belega estis ĝi. ;)×

'2 ("Ho, aŭdu eta avelbranĉ', vi  
kial belas tel\*?" ;)× ("Mi teron  
manĝas, akvon trinkas, tial  
belas tel." ;)×

'3 ("Ho, aŭdu eta virgulin', vi  
kial noblas tel?" ;)× ("Sukeron  
manĝas, vinon trinkas, tial  
noblas tel." ;)×

'4 ("Ho aŭdu, eta avelbranĉ',  
ne malatentu min: ;)× (Du  
fratoj miaj ĉe la reĝ', radike  
hakos vin." ;)×

'5 ("Min hakos dum la vintro,  
mi verdos dum somer'. ;)×  
(Sed virgulin' honorperdint'\*  
ne havos re da fier'." ;)× )

## & Neniam:

< Ripete 6 el 31 batoj por strofo, entute 155 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #4228. Verkis Aasmund Olavsson Vinje (1859). Popolmelodio. El norvega tradukis Jon Rømmesmo kaj Odd Tangerud.>

### (#Melodio:

<1,7:31> (

Mi /SiiLa Ti redo LaaLa So Mi;Mi ReeTI Do DoDo ReeRe Mi  
Mi;Mi SiiLa Ti redo LaaLa So o;Mi ReeTI Do DoDo ReeRe Mi  
i;Mi ReeTI Do ReRe MiiSi La a

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Ne/niam vi elmemore pasas,  
; ĉar rev' pri vi min ja ne  
forlasas. ; En lum', mallumo  
ĉeestas vi. (; Precipe nokte vin  
vidas mi.)×

'2 Vi ludas ĉirkaŭ mi dum  
vagado. ; Mi aŭdas vin en la  
korfrapado. ; Vi ĉiam sekvas  
min dum la ir', (; samkiel  
ombro post la vir'.)×

'3 Se iu venas kaj anson  
premas, ; ke estas vi en esper'  
mi kredas. ; Por bonvenigo  
eksaltas mi, (; sed vidas tuj ke  
ne estas vi.)×

'4 Ĉe ventbrueto en foliaro ;  
mi kredas vidi vin en  
branĉaro. ; Min trompas ade  
okaza ŝajn' (; mi kredas vidi  
vin kie ajn.)×

'5 En veturanto aŭ en rajdanto  
; mi vidas vin, eĉ en bild', en  
kanto, ; en son' de ĝojo kaj de  
dolor' (; Mi plej vin aŭdas en  
mia plor'.)× )

## & Plej urĝa tempo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 155 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

### (#Melodio:

<1,5:31> (

/mi mi dore mi mimi mimido re fa;fa mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mi3re doTi La; So3mi mimi re do)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Virin' en paperovendejon eniris ; Kaj al la vendisto mendante ŝi diris:

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.)**

'2 "Deziras mi pornecesejan paperon." ; Kaj tuj li respondis: "Por diri la veron: .....

'3 Ni novan provizon nur morgaŭ ricevos, ; Kaj tial ĝis morgaŭ atendi vi devos." .....

'4 Sed jen ŝi ekplendis: "Ho ia mizero! ; Ja tre jam urĝegas la grava afero. ....

'5 Kaj do aliloke mi devas ĝin mendi, ; Mi nepre ne povas ĝis morgaŭ atendi!" .....

## & Tramo kaj ĉevalo:

< Ripete 23 sed rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 155 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Araneo kaj vesperto".>

### (#Melodio:

<:31> (/LaLa dore; mimi mido; rere reTi; LaLa LaMi; LaLa dore; mimi mido; rere reTi;

(#Rekantaĵe: La La; mimi miso mimi rere reTi LaLa Mi; mimi miso mimi redo rere reTi La a)  
)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 (': Diris foje ; por ĉikano ; al ĉevalo) ; urba tramo:

(,: Diris foje ; por ĉikano ; al ĉevalo)

(×:; **tiel. ; Tretu en la danco, ; drume draŝu paŝa spur'. ; Dume noktaj bestoj dormu en la nesto nur.**)

'2 Malaperu ; en futuro, ; vi malgajnis ; en konkuro! .....

'3 La ĉevalo ; piedstampis, ; al la tramo ; malgalantis: .....

'4 Ci nur kuru ; laŭ linio, ; min ordonas ; mia mio! .....

'5 Ĉeval-gloron ; povas teni - ; sole kiuj ; scias heni! .....



## & Trumpeto kaj gitaro:

< Ripete 23 sed rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 155 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Araneo kaj vesperto".>

### (#Melodio:

<:31> (/LaLa dore; mimi mido; rere reTi; LaLa LaMi; LaLa dore; mimi mido; rere reTi;

(#Rekantaĵe: La La; mimi miso mimi rere reTi LaLa Mi; mimi miso mimi redo rere reTi La a)  
)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 (: Al gitaro ; kun impeto ;  
venis foje) ; la trumpeto:

(,: Al gitaro ; kun impeto ;  
venis foje)

(×:; **tiel. ; Tretu en la danco,  
; drume draŝu paŝa spur'. ;  
Dume noktaj bestoj dormu  
en la nesto nur.)**

'2 La muziko - ; por ekstazo! ;  
tial FORTO ; estu bazo. ....

'3 La gitaro ; diris jenon: ;  
Laŭdu propran ; fenomenon.

.....

'4 Tamen estas ; bruo granda ;  
plej prefere ; propaganda! .....

'5 Distingiĝas art-nivelo ; ne  
laŭ forto, sed laŭ BELO! .....

## & Fore li restas:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 160 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #4225. Finna popolkanto. Tradukis – verŝajne el sveda – K. Wijström (1908).>

### (#Melodio:

<1,7:4> (

/Mi MiMi do TiLa /La LaSo Mi Do; /Re ReRe So LaSo /Re FaFa Mi Do;

(#Rekantaĵe: Mi MiMi do TiLa /La LaSo MiDo Mi; /MiRe DoRe Mi i; /MiRe TiDo LA Ah)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Fore li restas de l'  
/valve 2rdaĵo ; /fore en ora de l'  
/reĝo arkaĵo

(×.; /**Birdo malgranda, ho  
/mia amik' de l' kor' ; /ĉu ne  
venos vi? ; /ĉu ne venos vi? )**

'2 Tie briladas virinoj plej  
belaj ; ne vin blindigu steletoj  
la helaj .....

'3 Birdo triladas en plej dolĉa  
kanto ; sed ĝin superas kantad'  
de l' amanto .....

'4 Tago de l' ĝojo, ĉu vi  
prokrastiĝos ; kiam kun li mi  
denove kuniĝos? .....

'5 Flugu amat' al la vala  
verdaĵo ; ĉar min perdigas la  
malkvetaĵo .....

## & Logas la aventur':

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 160 paŝoj dum 2 minutoj. Melodio el muziklibreto 'Luitboek van Thysius' (Amsterdamo 1590-1630). Verkis Marian Nesse (2008, 2016). Kantas Kapreol'.>

### (#Melodio:

<1,5:4> (

hTi /LaTi dodo LaLa Ti; /LaLa doTi LaLa Tii;LaTi /dodo reTi  
dodo reTi /doLa a La h;

(#Rekantaĵo: /La doohTi LaLa Ti; /La doTi LaLa Tii;LaTi /dodo  
re3Ti dodo reTi /doLa La a;)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Mi /grimpas alten sur la  
mont' ; /Estas streĉa, kruta,  
mond' ! ; Sur la /pinto estas  
grizo kaj ne/bulo nur.

(×: **Logas la aventur' ;  
Vokas la aventur' ; Se2n  
aventur' la vivo estas vana  
nur.**)

'2 Sidante en sun' sur sxip' sur  
mar' ; Sxajnas al mi paradiza  
rar' ; Sed sxipon turnis  
sxtorm', mi sidas sur kilo nun.

.....

'3 Mi vagas tra la praarbar' ;  
Kolare kantas birdoar' ; Sed  
mi ege vojeraras dum subiras  
sun' .....

'4 Pace ni dormas en la tend' ;  
Plena sxajnas la silent' ; Sed  
subite apro gruntas kaj teruras  
nin. ....

'5 Mi sidas sur la sxtorma  
strand' ; Bruas ses-metra ond-  
gigant' ; Sed pli alta sxtelas  
sakon, dronas la futur'. ....)

## & Malliberejo:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 160 paŝoj dum 2 minutoj. Kantis Gianfranco Molle.>

### (#Melodio:

<:4> (

(o;So dore /mi do oso somi /re e e;so soso /so so oofafa mire /do o)×2

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Skribu le/teron – al mia /ej'  
; Adreso /estu – ĉe  
mallibe/rej'

(×: **Mallibe/rejo –  
mallibe/rej' ; Adreso /estu –  
ĉe mallibe/rej'**)

'2 Birdo en kaĝo – birdo jen  
mi ; Morta pro amo – amo  
pri vi .....

'3 Se mi vin lasas – foriru vi ;  
Min ĉirkaŭbraku – estu kun  
mi .....

'4 Se mi enloĝus – en la  
montar' ; Ni estus tiam – tre  
bela par' .....

'5 En tiu valo – profunda val'  
; Dum la vespero – iras ĉeval'  
.....)

## & Taŭro kaj kolibro:

< Ripete 16 sed rekante 5 el 32 batoj por strofo, entute 160 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #4440. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per melodio kaj rekantaĵo de "Amikoj, fratuloj"(Norda Kantaro #4440.).>

### (#Melodio:

<:2> (

/Mi Mi /La La /Mi FalSo /Fa Fa; /Mi Mi /Re RelDi /LA DilMi /ReRe; DiRe /Mi i /Fa a; /Mi RelDi /Mi Mi; /Mi SilLa /Tildo TilLa /SilLa Tildo /La La)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Grandkornulo, (':; kori2feo, ; sin paŝtadi2s ; sur he2rbejo.)

(×:; **En la rozo** ;)

(':; kori2feo, ; sin pa2ŝta2di2s ; su2r he2rbejo.)

'2 Preterflugis ; en proksimo ; eta birdo ; kun trem-timo. ....

'3 Taŭro milde: ; Nur ne tremu, ; sur herbejo ; ekpromenu. ....

'4 Inter floroj, ; kolibreto, ; eĉ bov' iĝas ; nur poeto! ....

'5 Mi demandas en diskreto: ; Ĉu - "boviĝas nur poeto" ...? ....)

## & Inter du malbonoj:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 161 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por "La enamiĝinta leono" kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:23> (

a;Mi /LaLa TiTi dore mido Ti Ti;Mi rere TiTi dodo LaSi Ti Ti;

(#Rekantaĵe: La Ti dore mido Ti; rere TiTi dodo LaSi La)

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Bu/ĉisto kaj paŝtisto voje  
pasis. ; Jen, ili ŝafon, kiu bele  
grasis,

(×.; **Ŝafo volis vivi plu ; Ĝi  
elektis inter ili du.**)

'2 ekvidis vagi sur la kamp'  
senmastre, ; alkuris, kaj tuj  
ekkverelis draste, .....

'3 al kiu apartenu la trovito. ;  
Post longa disputado kaj  
ekscito, .....

'4 ĉar tiutempe ĉiu best'  
parolis ; ankoraŭ homalingve,  
ili volis, .....

'5 ke mem la ŝaf' decidu pri ĉi  
tio. ; Tiu demandis ilin pri l'  
metio, .....

'6 kaj, kiam la respondojn ĝi  
akiris, ; al la paŝtisto ĝi  
ekĝeme diris: .....

'7 "Nu, mi stariĝas do sur vian  
flankon, ; prefere doni lanon  
ol la sangon." .....

## & Senkompata oktobro:

<Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 161 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtein (2014). Baladigis Martin Strid (2015) per nova rekantaĵo kaj melodio inspirita de sveda polso "Vargpolska" (Lupa polso).>

### (#Melodio:

<:23> (

/DoMi FaaFaLa SoFa; MiSo doomimi reTi; SoTi faafami redo;  
TiLa SooFaFa MiFa;

(#Rekantaĵe: doSo SoMi; SoSo SoFa FaRe; Mi DoMi SoFa ReMi  
Do o)

)×7 )+

### (Strofoj:

'1 Senkompata oktobro ; miajn  
rozojn mortigis. ; Senkompata  
oktobro ; mian koron pretigis.  
.....

(×: **Paŝu takte ; kaj ne tro  
barakte. ; Morgaŭ plu venos  
nova tag'**.)

'2 al la blanka baldaŭo, ; kiu  
venos kun vento, ; al la vintra  
longdaŭro ; ekde frua  
novembro. ....

'3 Mi ankoraŭ dancete; la  
ĝardenon pilgrimas. ; Mi  
ankoraŭ falsete ; viglan kanton  
enrimas, .....

'4 sed jam rampas serpente ;  
malvarmeto animen, ; sed jam  
tro alisente ; vortoj venas  
enrimen – .....

'5 pigre, malinterese, ; enuege  
atakas. ; Ĉu mi tiom altpreze;  
miajn rozojn pritaksas?.....

'6 Ho, ĉe sojlo de l' vintro ;  
bedaŭrindas la perdo! ; Sed la  
vivo jam min tro ; bone ŝargis  
je sperto. ....

'7 Certas mi: pli ol plendo ;  
nun valoras la movo, ; post  
tagaĉoj de splen' do ; venos  
taŭga bontrovo. ....)

## & Mi songîs dum nokthoro:

< Rekante 21 el 33 batoj por strofo, entute 165 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931) kun klarigo: (Lirika poemo kun komentario). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:33> (o;So /dodo dore mi mi;mi soso fami re re;So TiTi Tido re re;re fafa mire do do;

(#Rekantaĵe: dodo dore mi mi;mi soso fami re re; TiTi Tido re re;re fafa mire do do)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 (×: /**Mi songîs dum nokthoro..** ;) (Pardonu, Heinrich Heine. ; Ĝi estas monopolo ; De multaj homoj ŝajne.)

(×:; **Songoj ĉu vualas ; dum danco ĉi realas ; Paŝoj plankon falas ; Al songoj ili malas.**)

'2 ..... (Pro manĝo tro abunda, ; Laŭ diro de l' doktoro ; Mi estas songîfekunda.) .....

'3 ..... (..kaj fakte songînkubo ; Formiĝas per vaporo ; El plena stomaktubo.) .....

'4 ..... (– Se mi pri kio dirus, ; De ŝtata prokuroro ; Atenton mi altirus!) .....

'5 ..... (Sed ĉu vi nun ne kredas, ; Ke ĉiu songaŭtoro ; Normalajn homojn tedas?) .....



## & Kien floroj iris do:

< Ripete 26 sed rekante 18 el 34 batoj, entute 170 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis kaj komponis Pete Seeger. El angla tradukis William Auld. Baladigetis (2016) Martin Strid >

### (#Melodio:

<:34> (

/SoLa SoFa MiRe Do; do redo TilLa So; SoLa SoFa MiRe Do; Fa FaMi Re e; SoLa SoFa MiRe Do; dodo redo TiLa So o;La FaRe DoMi So oLa FaMi Re eDo Do o

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 (: /Kien floroj iris do?)

(×:; **Jam tempo pa2sas.**)

(,:; Kien floroj iris do?)

(×:; **Jam tempo for.**)

(,:; Kien floroj iris do? ;)

Junulinoj prenis tro.

(×:; **Ĉu nepre tiel plu? ; Ĉu nepre tiel plu?**)

'2 Kien junulinoj do? ..... La junuloj prenis tro. ....

'3 Kien la junuloj do? ..... Ili soldatiĝis tro. ....

'4 Kien la soldatoj do? ..... La tombejoj prenis tro. ....

'5 Kien la tombejoj do? ..... Iĝis floroj ili tro. ....)

## & Arto de vivo en paroj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Zbigniew Galor (<http://www.zbigniewgalor.pl>, 2004). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

(/miimimi remi dodo; domi so fafa mimi; mimi reeremi doodo;do dodo TiSo La La;

(#Rekantaĵe: mi remi domi so fafa mi; miimimi remi dodo Ti; miimimi redo TiSo La a)

)×6 )+

### (& Strofoj:

'1 En la duobla mondo, ;  
materia – spirita, ; vivo iĝis la  
arto ; al paroj dediĉita.

(×:; **Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar. ; Ĝuste la du – amata par'!** ; **Ĝuste la du – amata par'!**)

'2 Dialektika principo: ;  
eternaj “pro” kaj “kontraŭ”, ;  
ĝemela la duopo. ; Unu kaj unu, ne “aŭ”. .....

'3 Vivi en paro kun vi. ; Ne sole, ne en grupo. ; Ne, ne amase – des pli. ; Nur vi kaj mi sen dubo. ....

'4 Estu al mi por la par' ; kiel mankanta ŝuo, ; aŭ trovita gant'. ; Silento post la bruo.

.....

'5 Ni – paroj el albumoj, ;  
lernej', geedzoj, gepatr'. ;  
Duope, sed sciantaj, ; ke ĝis tri foje la art'. .....

'6 Manko pro kruela sort': ; ŝi sen li aŭ li sen ŝi. ; Ĉiam iu en duopo kun mort'. ; Neniam sen paro restas mi. ; Nek tri, nek naŭ. Nek kvardek kaj kvar. ; Ĝuste la du – amata par'! ; Ĝuste la du – **kaduka** par'!)

## & Birda festo:

< Ripete 21 sed rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961) kun priskribo "Kantaĵo". Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:29> (/((dodo domi so so; laso fami mi re)×2 rere remi remi fami reTi So; rere remi remi fami reTi do o)×6 )+

### (& Strofoj:

'1 (Ludu la muziko! ; diris foje strigo.)×2

(×:; (**Gaje kantu, tondre dancu en la ĉen'** ; )×2)

'2 Ĉiuj dancu, kantu, ; ĉiuj gaje saltu! .....

'3 Saltu kiel gum'; bum-aj bum! ;; Aj bum! .....

'4 Nia kara strigo! ; moke vokis pigo, .....

'5 kiu volas danci, ; devas ja financi: .....

'6 Tuta komunum' ; sen la plum'. ;; Aj bum! .....

## & La ĉevalo kaj la azeno:

< Rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:29> (

/La LaLa LaLa SoLa Ti La;La Ti La; La doLa SoSo SoSo Ti  
La;La Ti La;

(#Rekantaĵe: do do TiLa So; TiLa La; do do TiLa So; TiLa La a)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 /Sen ŝarĝo la ĉeval'  
promenis ; fiere. ; Post ĝi  
azeno ŝarĝon trenis ; sufere,

(×:; **Gaje paŝu nun ; en la  
ĉen ; ĝis leviĝos sun' ; en  
maten'.**)

'2 kaj ĝeme petis: Kamarado, ;  
min helpu! ; Ne lasu, ke min  
la penado ; elĉerpu! .....

'3 Vi la duonon portus lude, ;  
transprenu, ; ke mi, ŝarĝita tiel  
krude, ; ne svenu!" .....

'4 Sed ridis la ĉevalo, vanis ;  
la voko, ; orgojle dancis ĝi,  
rikanis ; kun moko, .....

'5 ĝis la azen' la penon jam ne  
; elportis, ; ekstumblis, falis,  
blekis: "Damne!" ; kaj mortis.  
.....

'6 Nun devis porti tiu orgojla ;  
la plenon ; de la azena ŝarĝo  
— kaj la ; azenon. ....)

## & La lango kaj la mano:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado, disduigante versojn.>

### (#Melodio:

<1,5:29> (

a;Ti /doTi redo doTi Ti;La LaLa LaMi LaLa; LaaLaTi doTi TiTi  
Ti;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi;  
MiiMiMi LaTi do Ti La)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Rifuĝis vulpo: Pelis ĝin ;  
ĉasisto kun armilo. ;  
Lignohakiston trovis ĝi, ; lin  
petis pri azilo,

(×:; **Paŝu gajan la dancon ;  
Brilas aŭroro bele taga ;  
Venu en alta somertemp'!**)

'2 kaj li en tendo kaŝis ĝin. ;  
Tuj poste alrapidis ; kaj kriis  
la ĉasisto: "Hom'! ; ĉu vulpon  
vi ne vidis?" .....

'3 La homo negis per parol', ;  
sed montris per mangesto ; la  
lokon, kie kaŝis sin ; la  
rifuĝanta besto. ....

'4 La vorton kredis la ĉasist', ;  
la geston ne komprenis, ; plu  
kuris do. El la kaŝej' ; la vulpo  
nun elvenis .....

'5 kaj paŝis for silente. "Ej!" ;  
— la homo diris — "strange! ;  
Mi savis vian vivon, kaj ; vi  
iras for sendanke!" .....

'6 Respondis tiam lin la vulp':  
; "Mi dankus plej distinge, ; se  
via man' kaj via lang' ; parolus  
samalingve." .....

## & Lasta kiso:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Edmond Privat (Tra l' silento, Letchworth 1912). Baladigis Martin Strid (2016) ) per feroaj melodio kaj tradukita rekantaĵo de Balado de Virgar.>

### (#Melodio:

(# Virgars Kvæði:

a;Mi /MiLa LaTi TiTi doore;re redo doTi TiiMi;Mi LaLa TiTi  
TiTi doore;re redo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti  
doTi La)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Vi kien flugas, papilio, ;  
Tremante kaj rapide? ; Jam  
mortis rozo kaj lilio ; Kaj  
venas frost' perfide.

(×: **Nun emas mi en danco  
jam iri ; dum rozoj, lilioj ;  
kreskadas tre.**)

'2 Flugiloj viaj kvazaŭ lampo ;  
Brietas en nebulo. ; Vi kion  
serĉas tra la kampo, ; Perdita  
somerulo? .....

'3 Dezertaj estas la ĝardenoj, ;  
Tra kiuj vagis amo via. ;  
Skeletoj ŝajnas la vervenoj ;  
Sub kverko senfolia. ....

'4 Vi kial flugas en malvarmo  
; Tra flora la tombejo? ; Sur  
ĉiu loko pluva larmo ; Nun  
restas en herbejo. ....

'5 Silentas ĉiuj en la nestoj ;  
Kaj svenis bonodoroj. ; Jam  
ne batalos vi kun vespoj ; Pri  
la floretaj koroj. ....

'6 Jen restas nur en kampo  
vasta ; Velkinta krizantemo, ;  
Sur kiu kiso via lasta ;  
Mortigos vin en tremo. ....)

## & Libero:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per toreshavenaj melodio kaj rekantaĵo de Jalgrujma balado, Norda Kantaro #4407 kaj disduigo de versoj (;).>

### (#Melodio:

<:29> (

(#Toreshavena: o;so /soso sodo rere soso; milso lalso so;so miisoso laso soso soso; milre milfa so;)

(#Rekantaĵe: sola so somi re do; re rere so somi so; soso somi re do)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Li/beron plenan ĝuis iam ;  
la2 ĉe2val', ; laŭplaĉe kuradis  
en la kampo, ; tra2 la2 val'.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme  
; tretu fiere en ĉen' ; staras  
jen mastrino.)**

'2 Alvenis foje kaj ofendis ;  
ĝin la cerv' ; per malklarigo de  
fonto kaj huf;treto de herb',  
.....

'3 Ĝi volis venĝi, sed kun pli ;  
rapida sving' ; la cervo kuris:  
Ĝi fiaskis ; pri l' ating'. .....

'4 Kolero en ĝi bolis, kaj ĝi, ;  
en impet' ; nun al la homo  
turnis sin kun ; helpo-pet'. .....

'5 Ĉi tiu diris: "Bone, la  
cervon ; ĉasos mi, ; se bridon,  
selon al vi meti ; lasos vi." .....

'6 La cervon murdis la ĉasist' ;  
per lancotraf', ; sed la ĉeval'  
por ĉiam iĝis ; lia sklav'. .....

## & Memorigo:

< Rekante 17 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Wisława Szymborska (Vokado al Jetio, 1957). Tradukis Lidia Ligeza (Mi inventas la mondon, 2015). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:29> (/mimi mifami redo; Tido TiLa SiLa; mimi mifami redo; TiLa LaSi TiLa;

(#Rekantaĵo: mi mire doTi Ti La dodo rere mimi;mi mire doTi Ti La dodo TiTi La La a)

)×6 )+

### (& Strofoj:

'1 /Sub la sunoj de l' roso ;  
amis sin la paro, ; sek-foliojn  
kaj teron ; prenis en hararon.

(×: **La koro de hirundo ilin  
ekkompatu ; La koro de  
hirundo ilin ekkompatu.**)

'2 Ili foliojn kombis ; kaŭrante  
ĉe la lago ; kaj fiŝoj alnaĝadis  
; en stelforma vago. ....

'3 Spuroj de arboj faris ; sur  
ondoj dekoron. ; Faru, hirund':  
pri ili ; plu restu memoro. ....

'4 Hirundo, ombr' de nubo, ;  
ankro de l' aero, ; Ikaro pli  
perfekta ; enĉiela frako, .....

'5 hirundo, kaligrafi', ; montril'  
sen minutoj, ; frutempa bird-  
gotiko, ; strabo en ĉielo, .....

'6 hirundo, muto akra, ; kaj  
gaja funebro, ; nimbo de  
geamantoj, ; kompatu nin  
nepre. ....)



## & Amuzas maristo juna:

< Ripete 10 sed rekante 6 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4442. El sveda tradukis Kukoletto (1993 FLOrE).>

### (#Melodio:

< 175 batoj, 3 minutoj.> <:25> (

a;La /miimimi fafa mi La3Ti dodo Tiido1Ti Lami mi i;La mimi siti lalsi mifi so3la sofi mi i;La mimi mamifiso mimi La;Ti do3redoTi La

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Amuzas maristo juna sur verda kampo2 sin, ja ja ; Renkontas junuli2non, ho bela junulin' ; kantadu trala lala lala lej ; ho bela junulin'.

'2 Ĉu volas vi esti mia sur la kampa verd, **ja ja** ; Ni plukos rozfoliojn (': por lito en la herb')

(×:; **kantadu trala lala lala lej** ;) (,: por lito en la herb'.)

'3 Kaj baldaŭ estis lito, kaj rozoj tie por ĝu', ja ja. Do kuŝis ili kune, geedziĝontaj du .....

'4 Matene ilin vekis dolĉa venta blov', ja ja. Sed estis for la rozoj de l' junulina brov' .....

'5 Kompatu min gracia Dio, perdiĝis mia virgec', ja ja. Sed iros for malĝojo se vi estos mia edz' ;

'6 Ne povas mi nek volas esti edzo al vi, ja ja ; ĉar ŝipo mia pretas jam veli for de ĉi .....

'7 Malankras ek la ŝipo, sur ondoj velas for, ja ja. Sur bordo staras junulin', malĝoja ŝia kor' .....

## & Cigno kaj alvuso:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:25> (a;La /dore mi mi;fa mire Ti Ti;La Tido re re;mi reTi La La;La dore mi mifa mire Ti Ti;La Tido re remi reTi La La)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 La fiŝidaro ; en eta lago ;  
traserĉis akvon ; laŭ la  
zigzago.

(×:; **Kaj fiŝoj naĝas  
profundan akvon, ; volas  
plenigi sian stomakon.**)

'2 Kaj aperigis ; grandan  
novaĵon, ; ĝin mire gapis ; en  
la vizaĝon. ....

'3 Enigma birdo ; la blanka  
cigno ; kun longa kolo - ;  
demando-signo: ....

'4 Ho, via Moŝto, ; ĉu estas  
vero, ; vi bele kantas ; en  
mort-mizero...? .....

'5 Nu, povas esti, ; vi punkto-  
strekoj, ; ke iam kantas ; la  
cigno-bekoj. ....

'6 Mi ĝis nun vivas ; en plena  
sano, ; neniel pensas ; pri la  
nirvano. ....

'7 Ja min persone ; trafis  
feliĉo: ; en mia lago - ; da vi  
sufiĉo! .....

## & Eta kaŭzo – granda efiko!:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino".>

### (#Melodio:

<:35 > (a;La /LaLa doLa Tido reeTi;Ti rere doTi Lado LaaLa;La LaLa doLa Tido reTi; re doTi Lado LaLa

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La La;)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 La /sciencistoj certe pravas ;  
Dirante, ke, samkiel homoj, ;  
La floroj, fruktoj kaj legomoj ;  
Malsamajn seksojn havas.

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun  
rakonton ; Sonu laŭde kun  
la fonto ; Plankon paŝe,  
drume draŝe ; Estu  
interhoma ponto.**)

'2 De bela arbo, postsomere, ;  
Defalis piro kaj surtere ;  
Renkontis sian amatinon, ;  
Ruĝvangan la pir-inon... ..

'3 Li pri soleco ŝin konsolis ;  
Kaj varmiĝinte ekpetolis, ; Kaj  
amindumis la gepiroj ;  
Samkiel la geviroj! .....

'4 En densa ombro de l'  
herbaro ; Ge-amis sin la pira  
paro... ; Ŝi naskis idon, kun  
doloroj, ; Laŭdeve post naŭ  
horoj; .....

'5 Kaj ĉiuj piroj kun aklamo ;  
Bruegis je ĉi tiu vido, ; Ĉar  
estis ido de l' pir-amo ;  
Ververa... Piramido! .....

## & Fredmana kanto n.ro 61-a:

< Ripete 6 sed rekante 4 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #5190. Verkis Carl Michael Bellman (Fredmans sånger, 1791). Tradukis Martin Strid (2014).>

### (#Melodio:

<:25> (oomifa /sodo reTi do Soo;mifa sodo milredolTi do oo;mifa sodo reTi do Soo;mifa sodo milredolTi do o;do fa a;la so oo;mifa soSo doo;mifa soSo do)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Bonan /tagon, frato dika, ;  
la botelon ce2la2s mi. ; Mi ne  
konis pli amikan, ; do  
bonvenu fe2sto2n ĉi. ; Je san'!  
; Je san'! ; Restu jam ĉe ni! ;  
Restu jam ĉe ni!

'2 Vin, amiko, forto vetas, ;  
gaja tro aspe2kta2s vi. ;  
Komplimentojn for, mi petas,  
; bele nun kisi2ĝu2 ni. (×; **Je  
san'!** ; **Je san'!** ;) (Nun kisiĝu  
ni!)×

'3 Vi el kie venas, ronda, ; el  
Mozelo a2ŭ e2l Rejn? ; El  
Bordoz' aŭ fino monda? ;  
Tamen bonas vi2 po2r vejn'.  
..... (Bonas vi por vejn'.)×

'4 Gorĝo mia longe songis ;  
vin, malnova ka2ma2rad'! ;  
Nun malsupren en ĝin plongu  
; sen iama re2ve2nad'! .....  
(Sen la revenad'!)×

'5 Nu, ni drinku, bravaj kuzoj,  
; Hej! Kuraĝon, bo2nmi2en'! ;  
Lasu kolojn iĝi kluzoj ; kien  
vino ve2la2s en. .... (Vino  
velas en!)×

'6 Dank' al di' pro ventro,  
buŝo, ; sed mi ne kapa2bla2s  
pli. ; Miajn fortojn kaptas  
kuŝo. ; Glason ne plu vi2da2s  
mi. .... (Ne plu vidas mi.)×

'7 Voku pastron por apero, ;  
testamenton tu2j spe2cif'. ;  
Sed mi drinkos la ceteron, ;  
por ne morti e2n so2if'! .....  
(Morti sen soif'.)× )

## & Granda bovo:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #4430. El sveda tradukis Kukoleto (1993 -IO-E). Klarigoj (\*): '1 Vu = vi unu ; na granda bovo = grandan bovon ; kvel = kiel. '4 Kva = kiu.>

### (#Melodio:

<1,5:35> (

;/LaaTi doTiLaSi Lado mii;mi soofa mire TilTi re;re doore  
miiredo TiiTiSi Mii;Mi LaaTi doLa SiilLa La a;

(#Rekantaĵe: LaaSiLa Ti; dooTido refa miidoTi La; Laadore  
miimimi soomire mi; miidoTi La; Tiidore mi iSi SilLa La a;)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Donos mi al vu\* na granda  
bov'\* ; kaj buntos tiu be2sto ;  
Unu korno streĉiĝos ĉielon ;  
alia kurba e2stos.

(×: **Turnas en tord' ;  
ŝtrumpoj voleme kurbas en  
kord' ; Faros fripono kvel\*  
burĝa la ul' ; mallarĝa pord'  
; rozojn elektu ru2ĝajn.)**

'2 Donos mi al vu na granda  
hal' ; kun dek du litoj molaj ;  
Tie havos vu nokton en pac' ;  
kun vuaj servistoj volaj .....

'3 Donos mi al vu na  
belknabin' ; arĝentkudritajn  
vestojn ; sambukflorojn kaj  
plenos or' ; en ŝia monokesto  
.....

'4 Rajdos vu sur griza irĉeval' ;  
kva\* estos besto granda ; Alte  
sele vu sidu sen fal' ; veturi tra  
la landoj .....

'5 Donos mi al vu na kaprinaĉ'  
; kaj plu na du kapruĉoj ; Unu  
estos por diko kaj gras' ; l' alia  
por feliĉo .....

## & Ĝon Boj:

< Ripete 8 el 25 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Nils Ferlin (En döddansares visor 1930). Komponis (1979) kaj tradukis (2009) Martin Strid. Norda Kantaro #5595.>

### (#Melodio:

<:25> (

So /do omi re emi soso mido reLa La;So domi mimi reso so;so mido reTi do o;So domi mimi reso so;so mido reTi do o)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Ĝon /Boj, Ĝon Boj, jen /knab' el okcidenta fin', (; la /kara filo de l' patrin ; kaj /ŝia aĝofort'.)×

'2 Tam-tam, tam-tam, fiera militista vir' (; Ĝon Boj ek trovis dum la ir' ; al granda bela mort'.)×

'3 Ĝon Boj, Ĝon Boj, li estis gaja amuzul' (; en la tranĉea aventuro, ; brila kamarad'.)×

'4 Li falis, falis, sune ĉe la Yper-strand' (; por reĝo kaj por patroland' ; ĉar tranĉis lin grenad'.)×

